Manuel Halvelik (Kamiel Vanhulle)

La 29-an de junio 2016 forpasis en Antverpeno la flandra astronomo, lingvisto kaj verkisto Manuel Halvelik (1925-2016). Lia vera nomo estis Kamiel Vanhulle, sed en Esperantio li famiĝis sub sia pseŭdonimo Manuel Halvelik. Li estis multjara dungito de Grafika Centro Antverpeno de Flandra Esperanto-Ligo kaj kunlaboranto de la magazino *Monato*. Li interalie ellaboris tri fikciajn variantojn de Esperanto, dialekteskan (Popido), krimulslangan (Gavaro) kaj arkaikeskan (Arcaicam Esperantom), kiujn aliaj verkistoj uzas en siaj verkoj. Li ĉefe verkis en Esperanto, sed ankaŭ nederlande, france kaj angle aperis verkoj de li. Lia Esperanta verkaro inkluzivas tri astronomiajn librojn kaj la sekvajn lingvistajn: *Normlingva Esperanto; Universala skribo; Arcaicam Esperantom; Popido; Normigo de helenlatinaj terminoj en Esperanto; Lingvonormiga reformo de Esperanto; Nova Nomsistemo por Lingviko; La internacia terminologia ŝlosilo por sciencoj kaj teknikoj; Gavaro;*